

# BELGA ★ ESPÉRANTISTO

Fondita  
en 1908<sup>a</sup>

Redakto:  
Maur. JAUMOTTE  
11, Avenue de Broye  
Willem-Alexandre

Oficiala Organo de



REGA BELGA LIGO ESPÉRANTISTA

P. C. K. de Belga Ligo Esperantista: N<sup>o</sup> 1337.67

AVO, PATRO, INFANO.

## Bruĝo, La Louvière, Antverpeno.

La jubilea Kongreso estas for. En la sekvantaj paĝoj, vi trovos raporton pri ĝi. Tiuj, kiuj ĉeestis,

kaj ke ili estis multnombraj, vi ĉiuj scias — tre malmulte jam atestis en la diversaj urboj belgaj kaj en la ĉirkaŭaj landoj, pri la plena kontentigo de la kongresanoj, kiu, post tri tagoj da laboro, da festoj kaj da vizitoj, disligis, plikuraĝigita per tiu ĉi kune travivita kongreso, kiu ion plian alportis al ni al ĉiuj antaŭaj.

La Kongreso de La Louvière alportis efektive al la ĉeestantoj, la plenan certecon pri la tuta revigligo de nia movado belga, post iom stagna periodo.

Mi ne scias, ĉu ĉiuj kongresanoj havis tiun saman agrablan senton kiel mi, kiam ili vidis, ĉe sama festentablo, la reprezentantojn de niaj tri kongresoj, la estinta, la estanta, la estonta, kiuj ŝajnis kunlabori kune, kvazaŭ tiu triumfo nur fakte estus unuo nedividebla.

Ĉiuj scias, ke F-ino Thooris, al kiu la L. K. K. de La Louvière donis la titolon de «baptopatrino», ne kontentigis pri titolo, sed fakte faris gravegan laboron kaj helpis ne nur per konsiloj, sed ankaŭ per agoj.

Kaj ĉiuj ankaŭ rimarkis, ke, kiam venis la vico de la Prezidanto de la L. K. K. de Antverpeno, por fari alvokon por la Kongreso de 1937, la vortoj jam estis antaŭe forprenitaj de li, pro la fakto, ke la dankvorto de S-ro Tassin estis nur varma esperkrio, ke Antverpeno povu sukcesi ankoraŭ pli belege ol La Louvière.

Ne plu ni estas personaj individuecoj, ne plu niaj grupoj estas lokaj privataj societoj.

Ĉiu konscias, ke nia movado nur povas antaŭeniri, se la individuoj forgesas en sia propagando sian propran personecon, se la grupoj forgesas siajn lokajn preferojn, por nur, en ĉio, havi antaŭ la okuloj la grandan celon, kiun ni volas kune efektivigi.

Kaj en tia spirito ne estas eble, ke nia movado ne prosperu.

Post nia bela Kongreso de Bruĝo, jam ni sentis,

en diversaj lokoj, la emon restarigi aŭ ekstarigi grupetojn. En La Louvière ni havis la okazon sperii, ke la semoj disjetitaj per la Kongreso de Bruĝo jam estis kreskigintaj.

Ni ne dubas, ke baldaŭ, speciale nun ankaŭ en la valona parto de la lando, ni sentos la sekvojn de la bonega sukceso de la Kongreso de La Louvière.

Estas tial, — kaj ne nur ĉar Kongreso alportas al ni belajn tagojn de amikiĝo kaj de plezuro, — ke ni, ĉiujare, devas helpi al la sukcesigo de niaj naciaj kongresoj.

Estas tial, ke post Bruĝo, post La Louvière, Antverpeno ankaŭ devas esti triumfo.

Triumfi, t. s. devigi ĉiujn, ne nur oficialulojn kaj jurnalojn sed ankaŭ la popolamason, vidi nin kaj paroli pri ni. Tion oni en granda urbo nur povas, se oni estas multnombraj, se vere la elekto de la salonoj, kie io okazas, montras, ke ni ne nur estas eble kvalitatplenaj homoj, sed ankaŭ, ke ni estas multnombra legio.

Tial precipe, ĝojigas nin tiom, ke jam pli ol 60 membroj aliĝis al nia Kongreso de 1937 kaj ke 54 jam ensendis sian kotizon.

Tio jam estas bela forirbazo por la L. K. K., kiu ĵus stariĝis. Sed estas nun ĉies devo helpi, daŭre helpi, por ke tiu nombro kresku.

La Kongreso okazos en urbo, kie oni ne devas timi pri la loĝado, pri la trovo de salonoj por okazigi festojn kaj festenojn.

Nur estas necese, ke la gvidantoj sciu sufiĉe frue, kiom da kongresanoj ili povas atendi.

Tial tiu ĉi ĉefartikolo kiu estas presata ĵus antaŭ la raporto de la Kongreso de La Louvière, — raporto, kiu devas esti la glorkanto je l'honoro de S-ro Tassin kaj de liaj kunlaborintoj — finiĝas per alvoko al la daŭrigo de niaj klopodoj por sukcesigi niajn kongresojn, alvoko, kiun ni resumas per:

Vivu la tri fraturboj Bruĝo, La Louvière, Antverpeno! Vivu la belga movado!

Maur. JAUMOTTE.



## REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

XXV<sup>a</sup> Belga Kongreso de Esperanto  
La Louvière 30-31<sup>a</sup> Majo- 1<sup>a</sup> Junio 1936

### Ĉiuj al La Louvière.

Malvarma, malbela, malseka vetero estis subpreminta nin dum la tagoj, kiuj antaŭiris la Kongreson kaj, kun melankolio, ĉiumatene en tiu lasta semajno antaŭ la por ni grava okazintaĵo, ĉiuj estis ekrigardintaj tra la fenestro...

Fine, la sabato alvenis. Iom pli bona ŝajnis la vetero, sed tamen neniu riskis foriri, ne kunprenante surtuton kaj pluv-ombrelon.

Kaj dum la vagonaroj el la diversaj direktoj alkuris al La Louvière kaj alportis tien la unuan kontingenton de kongresanoj, en la aretoj de amikoj, la temo « vetero » estis la plej multe priparolata.

Kiam tamen okazis la alveno en La Louvière ni estis bonvenigitaj, ne nur per bela verda alloga banderolo, ne nur de tute afablaj membroj kaj helpantoj de la L. K. K., sed ankaŭ per beleta vetero, kiu permesis ĉiujn esperojn.

### Al la Turisma Federacio.

Post disdono de la necesaj paperoj, post ricevo de la bezonataj informoj, ĉiuj rapidis al sia hotelo, por demeti la pakajojn kaj dum tiu, por la plimulto, vere eta promenado, ĉiuj havis la okazon vidi, ke La Louvière, pro la kongresa okazintaĵo, estis vere verdigita.

La Louvière posedas nur du grandegajn stratojn plenvivajn, en kiuj estas la grandaj hoteloj, magazenoj, kafejoj, kaj al kiuj alfluas ĉiuj la stratetoj de tiu en nur duonjarcento tiel rapide kreskiĝinta industria urbo.

Sed ĉi, kiu preterpasis tiujn du stratojn dum la Pentekostaj tagoj, ne povis ignori nian Kongreson. Je dek diversaj lokoj, ni vidis nian verdan flagon en diversaj modeloj. Ĉiuj ejoj, kie io estis okazonta, estis montritaj per granda flago. Ankaŭ do la imponiga kastela domo de la Turisma Federacio, ankaŭ do la urbdomo, kie okazos oficiala akcepto.

Post kiam ĉiuj estis revenintaj al la akceptejo, — la ordinara kunveno de la grupo —, oni de tie foriris al la « Closière », kie ni estis akceptataj de S-ro Parent, kiu faris al ni belan paroladon en nia lingvo.

S-ro Parent senkulpegis sin, se li ne tute korekte parolas nian lingvon, li diris sian simpaton por ĝi, simpaton, kiu ripozas sur la sperto, kiun li en internaciaj kongresoj havis pri la malfacilaĵoj, kiujn alportas la lingvodiverseco.

Li bonvenigis la kongresanojn en tiu « nigra laudo », kies naturbelajojn li tamen volis prezenti.

Li memorigis pri la artaj kaj historiaj vidindaĵoj, kiujn oni ankaŭ povas admiri en tiu parto de Belgujo, kiun multaj belgoj bedaŭrinde nur konas kiel industria regiono.

S-ro Parent al kiu S-ro Tassin estis prezentinta la kongresanojn, estis varme aplaudata.

S-ro Jaumotte, ĝenerala sekretario-kasisto, substrekis la grandan ĝojon, kiun ĉiuj havis, kiam ili, kiel unua bonveniga vorto, estis aŭdintaj Esperanto-paroladon.

Li atentis pri la bona antaŭsigno, kiu kuŝas en tiu fakto, por la XXV-a Kongreso.

### La laborkunsido.

En nesolena, sed tamen kompakta sekvantaro, oni reiris al la centro de la urbo ĝis al la librejo Falise, kie ni povis admiri ekspozicion de Esperantaĵoj, kiu ne nur povis interesi eksterstarantojn sed ankaŭ Esperantistojn. Dank' al la afabla helpo de la Bruĝa grupo estis tie kelkaj maloftaj dokumentoj, inter kiuj leteroj de D-ro Zamenhof, propramane skribitaj.

Je la 8-a 1/2, S-ro P. Kempeneers, prezidanto, malfermis la kunsidon kaj, post bona vorto, faris diversajn komunikojn.

Poste, li detale klarigis la demandon pri U. E. A. kaj petis

XXVI-a Belga Esperanto-Kongreso  
Antverpeno, 15-16-17 Majo 1937

### 1-a INFORMBULTENO.

Sen komentarioj, la L. K. K. prezentas sian unuan liston de Kongresanoj, kiuj pagis. Krome 9 samideanoj jam ensendis aliĝilon, por kiu tamen la mono ne jam atingis nin je la 15-a de Junio :

1. S-ro André Tassin	La Louvière
2. S-ro Paul Kempeneers	Bruselo
3. F-ino Yvonne Thooris	Bruĝo
4. S-ro Leon Cogen	Ninove
5. S-ro Maurice Jaumotte	Antverpeno
6. S-ro Hector Boffejon	Antverpeno
7. S-ro Auguste Faes	Antverpeno
8. S-ro Jacques	La Louvière
9. S-ro Swinne	Bruselo
10. S-ino D. Kempeneers	Bruselo
11. S-ino L. Cogen	Ninove
12. S-ino M. Jaumotte	Antverpeno
13. S-ino M. Boffejon	Antverpeno
14. S-ino Lucette Faes	Antverpeno
15. S-ro Roger Jaumotte	Antverpeno
16. S-ino H. Schoofs	Antverpeno
17. S-ro Leon Schoofs	Antverpeno
18. S-ino Van Bockel	Antverpeno
19. F-ino Maria Jacobs	Antverpeno
20. F-ino Julia Dubois	Antverpeno
21. F-ino Mathilde Hofkens	Antverpeno
22. F-ino Hélène Hofkens	Antverpeno
23. F-ino Jeanne Loquet	Antverpeno
24. S-ro Jules Ginsburg	Antverpeno
25. S-ro Paul Blaise	Londono
26. S-ro Moy Thomas	Londono
27. S-ro E. Pomérol	Boulogne-Billancourt
28. S-ro Albéric Humez	Douai
29. S-ino Suzanne Humez	Douai
30. S-ro Albert Thooris	Bruĝo
31. S-ro Charles Poupeye	Bruĝo
32. S-ino Gabrielle Poupeye	Bruĝo
33. F-ino M. M. Vanden Berghe	Bruĝo
34. S-ro F. De Bel	Bruĝo
35. F-ino Ant. Jennen	Bruselo
36. F-ino S. Obozinski	Bruselo
37. S-ino Félicie Staes	Bruselo
38. F-ino Mathilde Kestens	Bruselo
39. S-ro Lode Bas	Bruselo
40. S-ro Henri Castel	Bruselo
41. S-ino L. Castel	Bruselo
42. S-ro Jules Alofs	Bruselo
43. S-ro Petro Hart	Bruselo
44. S-ino J. Hart	Bruselo
45. F-ino Juliette Nachtergaele	Gento
46. S-ro J. Vancoppenolle	Ronse (Renaix)
47. S-ro Martens A.	Antverpeno
48. S-ro Guillaume Loquet	Antverpeno
49. S-ro Robert Groverman	Gentbrugge
50. S-ro Pierre De Vooght	Bruĝo
51. S-ino De Vooght	Bruĝo
52. F-ino Monique De Vooght	Bruĝo
53. S-ino Angèle Grusiet	Gento
54. S-ro Oscar Van Dijck	Antverpeno

la delegitojn, ke ili ĉiuj voĉdonu, por subteni la estraron, la translokigon al Londono.

Al la diskuto, kiu sekvis, partoprenis S-roj Jaumotte,



La Kongresanoj antaŭ la urbdomo. — La urbestro sidas meze de la estraro.

Boffejon, Bingham kaj kelkaj aliaj.

S-ro Jacobssohn parolis pri lia sperto en la Konferenco Internacia por la Paco, kiu okazis, antaŭ kelka tempo, en Bruselo.

Post anoncado pri la Scherer-vojaĝo kaj pri invito, kiun faris Belga Ligo por ke nia svisa samideano vizitu ankaŭ la belgajn grupojn, la sekretario enskribis diversajn membrojn laŭprofesie, por esti utilaj en diversaj fakaj propagandagadoj.

Post tiu ĉi oficiala laborparto, oni aŭdis S-ron Van Coppennolle, ĉe la pianoforto, S-ron Masselier, kiu kantis kelkajn popularajn kantojn, kaj S-ron Moy Thomas en lia repertuaro.

Iom post noktomezo, ĉiuj reiris hejmen, por enlitiĝi kaj sin, tiel, bone prepari por la sekvontaj tagoj.

### Prediko en Esperanto.

Dimanĉe matene okazis dum ordinara meso en paroĥa preĝejo, la kutima Esperanto-prediko de Pastro De Meyer.

Antaŭ do miksa aŭdantaro, inter kiu kompreneble multaj ne-Esperantistoj, Pastro De Meyer koncize, sed tute trafe, diris vortojn de paco.

### Al la urbdomo.

Pro la speciala lokigo de La Louvière, ne estas grandaj distancoj por iri de kiu ajn ejo al alia.

De la preĝejo al la urbdomo nur kelkcent metroj estas iratoj.

En la urbdomo, la kongresanoj estis akceptataj en la urba labor-kambro, kiu, post kelkaj sekundoj estis plenkuna.

S-ro Tassin, nome de la L. K. K., prezentis la kongresaron al la unua magistrato de La Louvière.

S-ro Ghislain, francelingve, respondis kaj bonvenigis ĉiujn. Li diris sian ĝojon pro la fakto, ke la Esperantistoj elektis La Louvière por sia jubilea kongreso.

Li esprimis la deziron, ke iliaj laboroj povu esti fruktedonaj kaj senkulpegis sin, ĉar li ne rekte povis kompreni sin de ĉiuj kaj devis peti la prezidanton esti lia interpretanto por esprimi al ĉiuj belgaj kaj eksterlandaj vizitantoj, la

korajn sentojn de la enloĝantaro de La Louvière.

S-ro Kempeneers, kiel Prezidanto de la Reĝa Belga Ligo Esperantista, siavice dankis la urbestaron, pro la afabla akcepto kaj la urbestron pro la kuragiĝaj vortoj, kiujn li elparolis.

La ŝaŭmvino tiam aperis, kaj post kiam ĉiuj estis kune en Esperanto kaj S-ro Masselier aparte en franca lingvo kantinta « La Espero », ĉiuj trinkis je la sano de la urbestro kaj je la bonfarto de La Louvière.

Sur la ŝtuparo de la urbdomo, okazis tiam la fotografado, kaj feliĉe la pluvo, kiu dum la nokto kaj ĝis matene estis falinta, bonvolis halti kaj ni povas diri, forlasis nin, ĉar efektive la tuta kongresarango povis esti efektivegita, sen plia interveno de nia kvazaŭ nacia kaj speciale ĝojforiga pluvo.

Ke tiu fotografado same bone sukcesis, kiel ĉiuj aliaj punktoj de la programo, pravas la apuda kliŝo.

### La solena kunsido.

Sekvantare, oni tiam promenadis ĝis en la urba parko, kiu estas belega verda oazo en la industria La Louvière.

Tie, en unika kadro, montriĝas vere impona kaj interesa monumento: la memorŝtono al la mortintoj de la milito, soldatoj kaj civiluloj.

Akompanata de G-roj Tassin, S-ro Kempeneers demetis belan florgarbon nome de la kongreso, kaj S-ro Masselier, nome de la francaj partoprenantoj.

Post minuto da silento, promenade, oni iris al la kinematografajo « Palace », kie estis okazonta la solena kunsido.

Ĉe la estrara tablo kunsidis S-ro Kempeneers, prezidanto; F-ino Yvonne Thooris kaj S-ro Cogen, vicprezidantoj; S-ro Jaumotte, ĝenerala sekretario-kasisto, S-ro Poupeye, sekretario; S-ro Boffejon, anstataŭanto-ĉefdelegito.

S-ro Kempeneers faris la unuan paroladon en kiu li mal-longe skizis rerigardon al la pasinta jaro.

Li memorigis la mortintojn kaj havis specialan vorton por nia bedaŭrata ĝenerala sekretario S-ro Henri Pétiau, kiu forlasis nin ĵus kelkajn semajnojn antaŭ nia Kongreso.

S-ro Pétiau, kiu naskiĝis en Grosage, apud Belœil en



Managovio la 1-an de Junio 1877, do ne plene estis atinginta sian 50-an jaron, kiam kruela morto forrabis lin, preskaŭ subite, el nia mezo.

Starante la kunvenantaro pripensis dum minuto da silento la karajn mortintojn.

Poste ni aŭdis la raportojn de la ĝenerala sekretario kaj de la kasisto, ambaŭ prezentitaj de S-ro Jaumotte, kasisto, kiun la estraro petis plenumi, almenaŭ ĝis reguligo de la situacio, la gravan taskon de ĝenerala sekretario.

El ambaŭ raportoj, evidentigas, ke la situacio de la Reĝa Belga Ligo Esperantista estas vere favora, se ni konsideras la nunajn cirkonstancojn.

Kiel kasisto S-ro Jaumotte tamen faris alvokon al la monujoj kaj kolekto farita de F-ino MM. Van den Berghe akiris al la kaso, post daŭrigo dum la festeno, la belan sumon de Fr. 1095, kiun estrarano tiam ĝisigis ĝis Fr. 1.100.—

S-ro Kempencers tiam proponis la legigon, kiel «Societo sen Profita celo», de nia nacia Ligo. Post legado de la artikoloj farita notari-maniere de S-ro Jaumotte, la nova statuto estis aprobita.

S-ro H. Boffejon, anstataŭanta ĉefdelegito de U. E. A. raportis mallonge en la nomo de S-ro De Keteleare.

Diversajn salutojn, alportis, alilandaj kongresanoj.

Fine ankoraŭ okazis kelkaj preparoladoj al kiuj partoprenis diversaj membroj kaj en la plej bona atmosfero la solena kunsido finiĝis.

S-ro Poupeye intertempe oficiale protokolis pri tiu ĉi kunveno. Tiu raporto aperos en sekvanta numero.

## La Festeno.

Kaj tuj, ĉiuj iris al la apuda Hotelo «Excelsior», kie atendis nin bele aranĝitaj tabloj, ne en sufiĉa nombro tamen, ĉar, je la lasta momento, ankoraŭ enskribiĝis dekoj da partoprenantoj kaj, en la salono mem, sin prezentis amikoj, kiuj tute ne antaŭe estis enskribitaj.

Oni do malsupre en la restoracio devis aranĝi pliajn tablojn kaj malfeliĉe ne estis la laste aliĝintoj, sed la laste envenintaj samideanoj, kiuj tie devis sidi.

Malgraŭ tiu malagrablaĵo, la spirito restis bonega kaj ni tial speciale povas danki tiujn kiuj sin oferis por ne mal-aranĝi tiun belan feston.

Je la honortablo, prezidis S-ro Kempencers, kun dekstre de li la urbestro S-ro Ghislain, S-ino Tassin, S-ino Kempencers, S-ro Cogen, S-ino Coppée, Pastro de Meyer, S-ino Cogen kaj maldekstre F-ino Yvonne Thooris, S-ro Maur. Jaumotte, S-ino H. Schoofs, S-ro Jacques, S-ro Frère, prefekto de la ateneo, F-ino Jennen, S-ro Coppée direktoro de la mezgrada lernejo kaj S-ro Parent.

Post kiam ĉiuj estis, kun multe da ĝuo, englutintaj ambasadoran supon, diversajn antaŭmanĝaĵojn, marbordan salmajon kun venecia saŭco, rostitan kokidaĵon kaj laktukan salaton, kaj atendis la deserton, oni aŭdis diversajn paroladetojn.

Je la komenco de la festeno, S-ro Tassin estis jam dankanta ĉiujn la kongresanojn kaj siajn kunlaborintojn, sed poste sekvis la toasto al la Reĝo al kiu estis sendita telegramo (S-ro Kempencers), la toasto al la Sinjorinoj (S-ro Vermuyten, sprita poezio); danka respondo al la Sinjoroj (F-ino Jennen, delikata komplimento kaj propono pri harmonia kunlaboro); toasto al la fremduloj (S-ro Boffejon, kiu konsideras, ke neniu tie ĉi en Esperanta rondo estas fremdlandano) kun kora danko (S-ino Bramkamp, kiu prikantis la kunlaboron de la estraro kun la membraro), toasto al la ĵurnalistoj de S-ro Jacques, kun esperanta respondo de S-ro Dauchot, dankvorto de la baptopatrino de la Kongreso al la L. K. K. (F-ino Thooris, kiu samtempe donacas du argentajn florgarbojn al S-inoj Kempencers kaj Tassin) kaj kortuŝita respondo de S-ro Tassin (kiu jam alvokas por Antverpeno) kaj readvoko por la 26-a Kongreso (S-ro Jaumotte, kiu laŭte aplaŭdigas la

fakton, ke jam 50 sin enskribigis por tiu granda festo de la proksima jaro).

Kvankam ne oficiale antaŭvidita, S-ro Jacques vicprezidanto de la L. K. K. nepre, — kaj kiom kompreneble —, deziris festi speciale la Prezidanton S-ron Tassin, al kiu floroj kaj donacoj estis antaŭmetataj.

Restis la deserto... sed jam la Prezidanto estis forpreninta de la tablo la horloĝon, kiu dum la tuta manĝo kuŝis antaŭ li kaj estis ekstarinta. La tramoj atendis.

La oficiala laŭparolilo de la kongreso, — ni citu unufoje por ĉiam nian bonan amikon Jaumotte —, incitis ĉiujn leviĝi kaj rapidi por la vojaĝo al Binche.

## En la Urbo de la « Gilles ».

Ĉe la limo de la urbo ĉiuj estis akceptataj de la delegitoj de l' «Malnova Binche», sub la gvidado de S-ro Mcurisse kaj diversaj el liaj amikoj, oni, en du grupoj, faris interesan promenadon en la malnova kvartalo de la urbo, kun ĝiaj malnovaj remparoj parte ankoraŭ bone konservitaj.

Post tiu promenado, sekvis neantaŭvidita akcepto en la urbdomo, kie atendis la Esperantistojn S-ro Derbaix, urbestro kaj diversaj skabenoj kaj urbaj konsilantoj.

Post la prezentadoj, kiujn faris S-roj Kempencers kaj Tassin, la urbestro diris sian ĝojon bonvenigi en Binche tiel multnombrian aron da Esperantistoj kaj esprimis la bedaŭron, ke li ne povis nin akcepti en Esperanto. Tion li tamen faros... ĉe nia proksima vizito al la urbo.

....Nur dependas do de ni, ke tio okazu baldaŭ.

S-ro Cogen esprimis sian kontentecon pro tiu akcepto.

Kaj ree la tramveturiloj atendis kaj je la sepa oni ree estis en La Louvière.

## La vesperfesto.

Kaj kiel la leganto do povas rimarki, ne restis al la kongresanoj multan tempon por iri al la hotelo, alvestiĝi kaj esti akurate en «Palace» por la vesperfestoj.

Tial oni tie pardonis ioman prokraston.

Post «La Espero» ĥore kantita de la Bruĝa grupo, ni aŭdis belegan interpretadon de Cavatine, prezentitan de S-ino Ch. Poupeye ĉe l'pianferto kaj S-ro Alb. Hasenbroeckx, violonisto.

Tiam S-ro Masselier, ĝenerala sekretario de franca Asocio de Blinduloj esperantistaj, parolis pri la helpo de Esperanto por la blinduloj kaj kantis, kortuŝe.

S-ro Hector Vermuyten, kun emocio, deklamis «Pala Proceŝio» de Kalocsay, kaj tiu parto de la programo finiĝis per kantoj de la Reĝa Bruĝa Grupo, kun la akompanado de S-roj Moy Thomas, kaj Hasenbroeckx kaj S-ino Poupeye, kaj sub la gvidado de F-ino Alice Boereboom.

Fine sekvis bruplena kaj vigla dancparto, kiun, je la trafaj momentoj, haltigis F-ino Marcelle Bonge, lerta dancistino el La Louvière, kiu prezentis i. a. «La Morto de l'«Cigno», kaj viglan rusan dancan, nia konata amikineto Monique De Vooght, el Bruĝo kiu plej gracie evoluis, kaj la bruĝaj grupanoj, kiuj prezentis, en belaj kostumoj, la dancan de l'«Espero», kiu estis rea pruvo de la sindonemo de ĉiuj.

En ambaŭ partoj, ĉiuj interpretantoj de la programo estis varme aplaŭdataj.

Malgraŭ la fakto ke teatraĵo ne povis esti ludata, pro manko de konvena scenejo, kaj ke la anoncita parolata filmo ne povis esti montrata, ĉiuj per siaj aplaŭdoj montris sian plenan kontentecon.

La dua horo matene vidis la rehejmiĝon de la belga samideanaro.

## Vizitoj.

La oka horo kaj duono tamen jam vidis la hejmforlason de la belga samideanaro, kiu montris, dum la tuta kongreso, veran senlacigon, ĉar ĉie kaj ĉiam, la kontingento estis kiel

## XXVIII-a Universala Kongreso de Vieno.

Jen la ĉefaj informoj rilate al la Universala Kongreso, kiu okazos en Vieno de la 8-a ĝis la 15-a de Aŭgusto proksima:

Kotizo: ĝis la 15-a de Julio Sv. Fr. 25,50; por familianoj, Sv. Fr. 16; por infanoj ĝis 18-jaraĵ, Sv. Fr. 10,80.

Programo:

Sabaton, la 8-an: Inaŭguro de la Kongreso; interkonatiĝa vespero.

Dimanĉon, la 9-an: Diservoj. Ekskursoj. Prezento de la opereto: «La Blanka Ĉevalo», muziko de Ralf Benatzky; teksto de Hans Müller, kantoj de Rob. Tillenburg; Esperanta traduko de Nikolao Hovorka.

Lundon, la 10-an: Inaŭguro de la Somera Universitato. Ekskursoj.

Mardon, la 11-an: Laborkunsido; fakkunsidoj; akcepto en urbdomo; fotografado; vizito de Hofburg; ekskursoj.

Merkredo: 12-an, Somera Universitato; fakkunsidoj; konferenco de la virinoj; ekskurso.

Ĵaŭde, la 13-an: Tuttagaj ekskursoj (aparte pagotaj).

Vendrede, la 14-an: Laborkunsidoj; ekskurso; kostumbalo sub la devizo «La Kongreso dancas», en la festalonogoj de la Imperiestra Kastelo.

Sabate, la 15-an: Solena fermo de la Kongreso.

Poste oni povas partopreni al ekskurso «Tra Aŭstrio», de la 15-a ĝis la 21-a, laŭ jena programo: Vieno; Graz; Klagenfurt; Salskammergut, Gmunden, Linz, Melk, St. Pölten kaj Vieno.

Inter la karavanoj, kiuj kondukos la kongresanojn kaj kiuj povus interesi la belgojn, estas: Brita Esperanto-Asocio (S-ro Goldsmith, Londono); «La Estonto estas nia» (Reisbureau L. E. E. N., Amsterdam); Societo por Propagando de Esperanto (S-ro Petit, Rosny s. Bois).

eble plej kompleta.

La vetero, kiu favoris nin dimanĉe, ĉar ĝi ne subakvigis nin, kiel tio sammomente okazis en aliaj partoj de Belujo, estis ankoraŭ pli afabla la lundon.

Tiam vere estis varme, kaj ĉiuj nun lasis en la hotelo surtuton kaj pluvombreton.

Laŭ sufiĉe longa vojo, ni atingis la ŝiplevigilon de Houdeng-Goegnies kaj la tutapudan vitrofabrikejon «Glaver».

La kongresanoj dividiĝis en du grupoj, por fari sinsekve la vizitojn.

La levigilo speciale funkciis por la Esperantistoj, kiuj povis, per ĝi, supreniri, kaj en la vitrofabrikejo S-ro Van Renterghem, direktoro, donis interesajn klarigojn, kiujn lerte tradukis S-ro Jaumotte.

Por multaj, kiuj neniam vidis tiujn du tre interesajn aferojn, tiuj vizitoj estis vere unu el la plej grandaj allogaĵoj de la kongreso.

Bela promenado kondukis ĉiujn, akurate je tagmezo, en «Hotelo Mille Colonnes», kie atendis nin pli intima festeneto, sed tute bone organizita.

Tie ĉi la toasta serio estis ankaŭ pli intima, do pli mallonga.

S-ro Kempencers refoje dankis la L. K. K.-anojn en la persono de S-ro Tassin; S-ro Jaumotte aplaŭdigis la nomon de S-ro Kempencers, kiu vigle kaj lerte gvidis la debatojn kaj zorgis por ke ĉio akurate okazu, dum li dum la tuta jaro sin dediĉis al la plivigligo de la grupa kaj liga vivo.

S-ro Boutwood kaj S-ro Moy Thomas ankoraŭ aldonis anekdotojn, post kio S-ro Tassin konkludis per lasta dankvorto.

## Al Mariemont.

Kaj ree tute kontraŭ la hotelo atendis speciala tramvagonaro.

Senhalte, oni kondukis nin al Mariemont, kie atendis nin,

unue ĉe l'entreo de la parko, S-ro Albert Thooris, la amata patro de nia vicprezidantino, kaj, en la muzeo mem, ties amiko S-ro Faider, la konservisto de la kolektoj riĉegaj de tiu escepta muzeo.

Klarigi tiun viziton nian ne estas eble.

Ni diru, ke se la riĉeco estas granda, la vizito tamen sufiĉe rapide povas esti farata kaj tiel okazis, — io mirinda, ĝis nun nevidita en tiu ĉi Kongreso... — post detala vizito de la parko, la kongresanoj ĝuis ankoraŭ libertempon de unu plena horo, antaŭ ol denove envagoniĝi!

Unu horo, dum kiu ĉiuj, en la ombro de grandaj arboj povis, antaŭ beleta kafejo, sidi, trinkante fresan glason da biero kaj babilante pri la belaj festoj, kiuj ĵus forpasis... kaj pri la belaj festoj, kiujn la Antverpenaj amikoj jam inter si, sed tamen sufiĉe laŭte por ke ĉiuj povu aŭdi, ekpreparis.

## Rehejmiĝo.

La Louvière: disigo... En tiu elsalto de kvarcent kruroj el kvar tramvagonoj, ducent manoj interpremas unu la alian en adiaŭa signo, sed fine neniu ekzakte scias, kiun li jam adiaŭis kaj kiun ne... Sed ne gravas, ne temas pri adiaŭo, sed ĝis baldaŭa revido.

Kiam unu horon poste, multaj denove, hazarde, kun pakajoj renkontiĝis antaŭ la akceptejo kaj kriis lastan dankvorton al S-ro Tassin, brua muzikistaro preterpasis... Kaj vidu, malgraŭ la laceco, malgraŭ la pakajoj, sekvantaro formiĝis.

Kaj anstataŭ per tramo iri al Bouvy, tuta grupego da kongresanoj marŝadis kaj dancadis ĝis al la vagonaro.

Plej bona signo pri ĉies kontenteco! H.

## Lasta listo de Kongresanoj.

224. F-ino Liliana Florin	Lille
225. F-ino Yvonne Florin	Lille
226. F-ino Maria Jacobs	Antverpeno
227. S-ro Leveugle	Douai
228. S-ino Leveugle	Douai
229. F-ino Leveugle	Douai
230. S-ro Marcel Braet	Nieuwpoort
231. S-ro Henri Baton	Quiévrain
232. S-ro Jacques Timmerman	Gento
233. S-ro Alphonse Parent	Haine St. Pierre
234. S-ro Hubert Rancher	Douai
235. S-ro Paul Hanquet	Jodoigne
236. F-ino Marie Hanquet	Jodoigne
237. F-ino Stephanie Loozen	Jodoigne
238. S-ro Demoullins	Douai
239. S-ro Hankotte	Charleroi
240. F-ino Hankotte	Charleroi
241. S-ro Giot	Douai
242. S-ro Dumoulin	Douai
243. S-ro S. Mommaerts	Anzin
244. S-ino S. Mommaerts	Anzin
245. F-ino André Meyer	Denain
246. S-ro Gauvin	Denain
247. F-ino Eliza Rommens	Douai

Post tiu ĉi raporto, ni volonte enŝovas kelkajn liniojn de S-ro Tassin, kiu meritas ripozon, sed tamen ne volas ĝin preni, antaŭ ol li, refoje, estas dirinta sian grandan ĝojon, vidinte la kontentecon de ĉiuj, kiuj partoprenis nian jubilean kongreson kaj sukcesigis lin;

ne dirinte ankaŭ koran dankon al la amikoj de la L. K. K., kiuj helpis lin dum la prilaborado kaj precipe S-roj Charles Faure, Emile Jacques, Jules Bonge, Marcel Parfondry, Victor Dauchot, Maurice Daems, kiuj fervore laboris kun li, por fari tion, kio estis necesa, por kontentigi ĉiujn kongresanojn;

ne memoriginte la kongresanojn pri la fakto, ke la fotografajo ankoraŭ ĉiam estas havebla ĉe S-ro Bagnat, Rue Joseph Wauters, La Louvière, sendante Fr. 10.



## BELGA KRONIKO

### Komitata Kunsido de la 26-a de Aprilo

(Raporto prokrastita pro lokmanko)

Ĉeestis: el Antverpeno: S-roj Jaumotte, konstanta komitatano kaj Boffejon kaj Faes, delegitoj; el Bruĝo: F-ino Thooris kaj S-ro Poupeye; el Bruselo: F-ino Obozinski kaj S-ro Kempeneers; el Gento: S-ro Van de Velde; el La Louvière: S-roj Tassin kaj Jacques; el Lieĝo: S-ro Bissot kaj el S-ta Mariaburg: S-ino Elworthy-Poseaer, konstanta komitatanino.

Senkulpigitaj estis S-ro De Ketelaere, ĉefdelegito de U. E. A. kaj S-roj Petiau, malhelpata pro malsano; Babilon, konstanta komitatano, kiu petas eksigon el tiu funkcio ĉar li, post kvaronjarcento, ne plu kapablas ĝin plenumi kun la dezirita zorgo; S-ro Van Genechten (Hasselt) kaj S-ro Cafonnette, delegito de la nova grupo, en Charleroi.

Je l' demando de la prezidanto, la kunveno akceptas ankaŭ la ĉeeston de S-ro Swinne, helpanto de la Prezidanto.

Post legado de la letero de senkulpigo de S-ro Babilon estas decidite, sendi al li leteron de kora, varma danko pro la de li plenumita tasko.

Ŝangante iomete la ordon de la punktoj pri-traktotaj, la Prezidanto proponas la tujan akcepton de la nova grupo de Charleroi, starigita post propagando de la Ligo en la mezo de la « Cerele Polyglotte ». Jam vigla grupo, kiu aligis dekon da membroj, tie funkcias. La akcepto estas unanime decidita.

Post tio, la Prezidanto antaŭ la staranta kunveno, diras nekrologajn vortojn, honore de S-roj Merchant, Kreuz kaj D-ro Van der Biest.

S-ro Jaumotte klarigas tiam la moralan kaj financon situation de la Ligo. Ĝi estas tia, ke, kun la ankoraŭ normale espereblaj enspezoj por la nuna jaro, oni povas antaŭvidi la daŭrigon de la regula monata aperigo de B. E., sen granda deficeito.

Poste, estas preparolata la estonta agado: S-ro Kempeneers klarigas la organizon de la du parolado-serioj, kiuj okazis en kvar belgaj grupoj je iniciato de Belga Ligo. El la preparolado, klare vidiĝas, ke tiuj vizitoj estis tre ŝatataj. La Ligestraro jam antaŭvidas la venigon de aliaj paroladistoj por la proksima vintro.

S-ro Jaumotte klarigas la propagandon, kiun la Ligo faris apud la senatanoj kaj deputitoj, kaj kies rezultaton ĉiuj jam konas intertempe pere de B.E. kaj de la ĉiutagaj gazetoj.

S-ro Tassin tiam, nome de la L. K. K., klarigas la tutan programon de la kongreso de La Louvière, kiu certe bone sukcesos ĉar jam pli ol 150 membroj aliĝis, pli ol unu monaton antaŭ la Kongreso.

La Prezidanto insistas tiam, por ke, jam de

nun, oni liksu la lokon de la Kongreso 1937. Pro kialoj diversaj, la grupo de Antverpeno « La Verda Stelo » estas insiste petata, ĝin organizi.

Tuj S-ro Jaumotte akceptas la aliĝpagon kaj jam 14 membroj enskribiĝis. Jen nova rekordo!

La Prezidanto fine preparolas la internacian organizon kaj la novan situation de U.E.A. Letero estos sendata al la estraro por ke ĝi profitu tiun ŝanĝon por malpliigi la elspezojn, farante tiujn ĉi, kiel eble plej multe, en landoj kun malalta valuto.

Fine estas legataj la statutoj per kiuj Belga Ligo iĝos « Societo sen Profita Celo ». Diversaj membroj ensendos, dum la dek sekvantaj tagoj, la kelkajn ŝanĝojn, kiuj estis pridiskutitaj kaj poste la estraro kunmetos la definitivan tekston, kiu estos antaŭmetata, al la ĝenerala kunveno en La Louvière.

### Grupa Kalendaro.

ANTVERPENO. — Reĝa Esperanto-Grupo « La Verda Stelo ». — Kunveno « De Witte Leeuw », Frankrijklei, 4, Avenue de France: ĉi-sabate je 21 h.: kunsido laŭ indikita programo.

Sabaton, la 4-an de Julio: Parolata revuo.

Dimanĉon, la 5-an: Ekskurso per aŭtomobilego al Rotterdam, Scheveningen kaj Hago. Forirhoru 7-a matene, reveno ĉirkaŭ la 11-a. 23 membroj povas partopreni. Kosto: Fr. 60.—.

Sabaton, la 11-an: Parolado de F-ino Hélène Hofkens: Felix Timmermans.

Sabaton, la 18-an: Vizito al la « Nachtegalenhof » (Kunveno, je la 8 1/2 je Kafejo « Dikke Mee » (tramveturiloj 5 kaj 17). Se pluvas, paroladeto de S-ro Faes, en la kunveno.

Sabaton, la 25-an: Intima kunsido.

BRUĜO. — Bruĝa Grupo Esperantista. Reĝa Societo. — Ĉiumarde, je la 20-a. — SIDEJO: « Gouden Hoorn-Cornet d'Or », placo Simon Stevin, tel. 314.59; KUNVENEJO: Kafejo « Vlissinghe » Bleekersstraat, 2, rue des Blanchisseurs.

La 5-an de Julio (Dimanĉon) je la 10 1/2-a, sur la Granda Placo. Partopreno en la oficiala sekvantaro okaze de la Kolonia Tago.

Kunvenoj, ĉiuj en la kunveno:

La 7-an: Legado kaj klarigado de « Belga Esperantisto ». — Prez. S-ro Ch. Poupeye.

La 14-an: Kantvespero, gvidado: F-ino A. Boereboom — Fortepiano: S-ino Ch. Poupeye, Violono: S-ro Albert Hasenbroeckx.

Dum la ripozoj « Poŝtmarka Borso ».

La 21-an: Esperantaj Kartludoj, kun premioj. Prez. S-ro G. Groothaert.

La 28-an: a. Preparolado de S-ro G. Groothaert, pri « Protektado kontraŭ batalgasoj ». b. Debato pri libertempoj. Prez. F-ino Y. Thooris.

Ĉe bela vetero, iu el tiuj kunvenoj povos esti anstataŭata per vespera promenado.

BRUSELO. — « Esperantista Brusela Grupo ». — Kunveno: « Brasserie du Sac », Granda Placo, 4, ĉiulunde je la 20.30-a h.

London, la 6-an: BAS ???

London, la 13-an: Bredeno je la 16-a h. en la lernejo de la Rue de la Pêche — Wiptraed, vialto de la lernejo eks-petitaj: Ponto, promonado en la parko Duden.

London, la 13-an: Kun Jozefina prelegos.

London, 18-an: Vespertempo de la Brusela Polro. Foriro de La Sabato, je la 10 h. 15.

London, 19-an: Doktoro Mace prelegos pri Militgaso. Ponto, koncerto Ĉiu unu alportu siajn tomboluletojn, kiujn li donos kiel bono festilon.

LIEĜO. — Societo Lieĝa por la Propagando de Esperanto.

Perfektaĵoj kunvenoj:

en Lieĝo (Hôtel du Phare): Jaŭdon 9-an de Julio, je 20-a horo.

en Sclayn (Kafejo Decheene): Jaŭdon 2-an kaj 16-an de Julio, je 18 h. 30.

Ekskurso al Fonda des Cris, Beaufays (eventuale Tiff okaze de Hemanĉon 19-an de Julio. Rendezuo: Tramhaltejo Fonda des Cris (tramoj 14-a aŭ 15-a) je la 15-a horo.

### Grupaj raportoj:

« Ĉu tiu ĉi numero, ni enpresas tiun parton de la raportoj kiun ni prokrastis pasintan monaton: nova parto estas denove prokrastata pro lokmanko ».

ANTVERPENO. — Reĝa Esperanto-Grupo « La Verda Stelo ». — Sabaton, la 18-an, okazis bonsukcesinta literatura vespero, kun la kunlaboro de S-roj De Ketelaere kaj Vermuyten. La unua klarigis la libron de Upton Sinclair « Petrolo », kaj antaŭlegis interesajn partojn; la dua deklamis diversajn poeziojn, kaj ambaŭ estis rekompencitaj per varma aplaŭdo kaj laŭdvortoj de S-ro Boffejon, vicprezidanto.

La 26-an, la Printempa Kabaredvespero allogis multajn gemembrojn. Kunlaboris en ĝi: S-ino Vander Veken-Van Bockel, kiu denove tradukis novajn kantojn, kiujn ŝi ĉe la pianoforto akompanis; S-ino Lucette Faes-Janssens, kiu, unufoje pli, montris sian pianistan talenton; S-ro Vermuyten, deklamisto; S-ro Ameryckx, S-ro Wouters, humoristo kaj S-ro Vander Veken, kiu prezentis tre bone tipitan « skeĉon ».

La 2-an de Majo, la unua provo per « Parolata Revuo » bonege sukcesis. Krom la estraranoj S-ro Jaumotte, Boffejon kaj Faes, ankaŭ partoprenis en ĝi: S-inoj Schoofs kaj Faes, F-inoj M. kaj H. Hofkens, S-roj Van Dijek kaj Lodema. Tre certe, la dua numero de la revuo ankoraŭ pli bone aspektos!

La 9-an, S-ro Van Dijek faris tre lertan kaj interesan paroladon pri Gheel kaj, post ĝenerala aplaŭdo, S-ro Boffejon dankis lin kore.

BRUSELO. — « Esperantista Brusela Grupo ». — London, la 27-an de Aprilo okazis komitatkunveno, kie S-ro Jacobsohn parolis pri sia agado en la junularmedioj, kaj speciale en la Konferenco de la Junularo por la Paco.

London, la 4-an de Majo, Sinjorino Staes faris interesan prelegon pri Julio Baghy, kaj aŭdigis kelkajn kantojn de li.

GENTO. — « Genta Grupo Esperantista ». — Ĝenerala kunveno de la grupanoj okazis la 8-an de Majo en la hejmo de S-ino De Rijke.

Por kompensi iom en la grupaj aferoj la malaperon de nia agema amiko Petiau, oni decidis kompletigi la komitaton per tri personoj: S-ino De Rijke, S-ino Crislet, S-ro De Rese.

La taskoj estos la jenaj: Prezidanto: S-ro Vandeveld; Vic-prezidanto kaj Sekretario: S-ro Edm. Lödör; Vic-prezidantino kaj festestrino S-ino De Rijke; Kasisto S-ro De Man; Bibliotekisto S-ro Arpad Lödör; Help-kasistino; S-ino Gruslet; Help-sekretario S-ro De Rese; Help-bibliotekisto S-ro Papp. La unuagradan kurson gvidas S-ro De Man, la duagradan, S-ro Edm. Lödör, la perfektigan, S-ino De Rijke.

Oni intencas fari dum la Somero, samideanajn kamparajn promenadojn ludi teatraĵetojn, kaj fari amuzajn lingvajn ekzercojn.

BRUĜO. — « Bruĝa Grupo Esperantista ». Reĝa Societo. — La 14-an de Aprilo, 36 grupanoj ĉeestis kantvesperon, gvidatan de S-ino Poupeye kaj F-ino Boereboom. Du novaj kantoj de S-ro Moy Thomas estis lernataj, post tekstklarigado de S-ro Ch. Poupeye.

La 21-an, okazis korespondna vespero. Sekve al anonco en la « Praktiko » alvenis 27 kartoj kaj leteroj el 9 diversaj landoj; ili estis legataj kaj dladonataj por respondo inter la 38 ĉeestantoj.

La 28-an, S-ro R. Groverman, advokato, faris paroladon pri « Mortpuno », kaj per belaj anekdotoj kaj trafikaj konsideroj tute kaptis la intereson de la 40 ĉeestantoj, kiuj varme aplaŭdis la simpatian parolinton.

La 6-an de Majo, en « Café Belge », ĉe samideano Haesenbroeckx, antaŭ staranta ĉeestantaro, F-ino Thooris, Prezidantino, anoncis la grandan funebnon, kiu nin trafas per la morto de S-ro Henri Petiau, Ĝen. Sekr. de la Belga Ligo. Ŝi raportis pri la enterigo kaj klarigis ke malgraŭ la doloro, oni devas kuraĝe daŭrigi la laboron por la kongreso. Tiel ankaŭ tiam okazis la ripetadoj de la kantoj kaj de la dancoj por la kongresa festo.

### Al la U. E. A. Delegitoj.

Diversaj delegitoj sin turnis al Belga Ligo por seĝi, kinmaniere ili voĉdonu, pri la ŝanĝo de la sidejo.

Ĉiu voĉdonu laŭ sia konscienco, sed NEPRE voĉdonu TUJ.

Ni tamen atentigas pri la fakto, ke la Prezidanto, en La Louvière, insistis por ke oni subtenu la estraron de U. E. A. per JESA respondo, por eviti la plej malbonan solvon, la restadon en Genève.

## FRANCHOMME kaj K<sup>o</sup>

Rue des Pierres, 80, Steenstraat

— BRUĜO —

Ĉiuspecaj ŝtofoj kaj silkajoj

Blanka tolaĵo — Trikotajoj

— — — Meblaro — — —

## Firmo « NOVELTY »

S-ino L. VAN WASSENHOVE-BOCKHOLTS

2, Philipstockstrato — BRUĜO

KORSAĴOJ — TOLAĴOJ

Liveras en tuta Belgujo kaj laŭ korespondaj mendoj

## BELGA MARBORDO

Grand Hôtel d'Oostduinkerke

Bone konata de multaj Esperantistoj

P. BENOIT, Delegito de U.E.A. Posedanto

International Friendship League (Internacia Ligo de Amikeco) kiu fondis E-sekcion, invitas ĉiujn E-istojn al la Libertempa Centro organizata en Cité Universitaire de Bruselo, de la 1-a ĝis 31-a de Aŭgusto kaj al 4 vojaĝoj per aŭtoĉaroj al Han, al Antverpeno-Mechleno, al Bruĝo-Gento kaj al Waterloo. Multaj E-istoj, el diversaj landoj, ĉeestos. Petu klarigojn kaj kondiĉojn al S-ino Nyssens, 31, Avenue de la Chasse, Bruselo.



# La « MINIPIANO » BRASTED

PREZENTATA

DE


**G. FAES**

Schoenmarkt. 16  
Marché aux Souliers

ANTVERPENO

kostas

Fr. 3.250,—



## Anoncetoj

TURNU VIN AL SAMIDEANAJ FIRMOJ :  
EN BRUĜO

**ALGRAIN-COUCKE**, 23, Vlamingstr. rue Flamande,  
Tel. 33424. Nuntempaj Novaĵoj por sinjorinoj kaj knabinoj.

**CAFÉ de la BOURSE**, Granda Placo 22. Christiaens, Tel. 31424  
Rendevuejo de la Esp-istoj dum la someraj koncertoj.

**Café VLISSINGHE**, Vital Jehansart, Bleekerstr. 2, rue des  
Blanchisseurs. Kunvenejo de B.G.E. Artaj kaj ordin. vitraĵoj.

**RACHEL CARPENTIER**, Genthofstr. 36, rue Cour de Gaud  
Cigaroj, Tabako.

**CREMERIE de DIXMUDE**, F-ino M.M. Mestdagh, St Jacobstr.  
8 r. St Jacques, specialaĵoj : Butero, Ovoj, Fromaĝoj.

**DE GUCHTENEERE, J.** « Agence Maritime Minne », Komvest,  
44, Ŝipmakleroj, Transporto, Eldoganigo, Asekuro, T. 33422

**FOTO BRUSSELLE**, Steenstr. 41 rue des Pierres. Tel. 33411.  
Fotografado industria. Foto-Kino-Aparatoj, Akcesoraĵoj, laboroj.

**HOTEL VAN EYCK**, Zilverstr. 8. Familia Hejmo, Centra sed  
kvieta situacio, burĝa klientaro, moderaĵoj.

**M. HUYGHE**, Potterierei, 1. Ilustritaj poŝtkartoj, ĉiuspecaj  
memoraĵoj pri Bruĝo. Helpa Poŝtoŝeĉejo. Tel. 31561.

**LONGE**, Vlamingstr. 26 rue Flamande. Kafo, Teo, Ĉokolado,  
Biskvitoj. Tel. 31150.

**Emiel MESTDAGH**, Moerkerksehe Stw. 113 St-Kruis, Tapet-  
isto, Murpaperoj, Tapiŝoj, Drapiraĵoj, Seĝegoj.

**Ph. MICHOLT**, Koningenstr. 7, rue des Rois, apud Preĝejo  
Sta Walburgo. — Roboj, Manteloj.

**G. G. PLATTEEUW**, Noordzandstr. 25, r. N. du Sablon,  
Tel. 31523 ; Fromaĝoj, Kafoj.

**Antoine POUPEYE**, Dampoortstr. 23, St-Kruis. Tel. 31461.  
Ĉiuj asekuroj en la tuta lando. Informoj sen devigo.

**RAHIER**, Wapenmakerstr. 4, R. des Armuriers, Bombonoj.  
Migdalmiclaĵoj. Buteraĵoj.

**J. ROOSE**, Bdo Guido Gezelle 15. Tel. 32224.  
Holanda artefarita butero. Francaj vinoj. Senpera elveno.

**SABBE-DE VEEN**, Steenstr. 76, R. des Pierres. Tel. 33048.  
Floroj-Agento de « Fleurop » N° 669.

**VAN COMPERNOLLE**. « HET SCHAAPJE », Vischmarkt 6.  
Mebloj, Matracoj, Lano, Lanflokaj, Metalaj litoj.

**VOLCKAERT**, Geldmuntstr. 30, R. de la Monnaie. Tel. 33607.  
Porkaĵoj, Ĉasaĵoj, kortbirdaĵoj.

**WITTERYCK**, Steenbrugge, Tel. 33513.  
Ĉiuspecaj Esperanto-presaĵoj.

**KORESPONDADON** deziras F-ino Anne SHIRVINGTON, 46  
Carabella Street, Kirribilli, SIDNEY, N. S. W. Australio.

**L. VAN WASSENHOVE**

2, Philipstockstrato — BRUĜO

Librotenado—Organizado kaj enskribo de la libro  
— Kontrolo — Starigo de Bilancoj — Raportoj —  
Serĉadoj — Eksperlizoj — Komercaj Informoj.

**RADIOLUX**, Steenstraat 94 Brugge, Tel. 317.85  
KONTRAŬ LA ĈEFPREĜEJO

**RADIO APARATOJ—FONOĜRAFOJ—DISKOJ  
LAMPOJ—ĈIO POR ELEKTRO—K. T. P.**

ESPERANTO PAROLATA

**RADIOLUX**, rue des Pierres 94 Bruges. Tel. 317.85

## Estraro de « Belga Ligo Esperantista ».

Prezidanto : Dro Paul Kempeneers, 19, Avenue Montjoie,  
Uccle. (Tel. 44.53.00).

Vicprezidanto : S-ro Léon Cogen, 52, Dreef, Ninove.

Vicprezidantino : F-ino Yvonne Thooris, 4, Wijzakstraat,  
R. de l'Outre Bruĝo. (Tel. 320.86).

Ĝenerala Sekretario *ad interim* kaj Kasisto : S-ro Maurice  
Jaumotte, 44, Avenue De Bruyn, Wilryck (Antverpeno).  
(Tel. 777.58).

Ĉefdelegito de U.E.A. : S-ro Morris De Ketelaere, 25, Oosten-  
straat, Antverpeno. (Tel. 962.46).

OSTENDO

BELGUJO

**HOTEL VROOME**

20, BULVARDO ROGIER. TEL.37

RENDEVUO DE LA ESPERANTISTOJ

**HOTEL DU CORNET D'OR**

2, PLACE SIMON STEVIN

BRUĜO

Sidejo de la Bruĝa Grupo Esperantista (Reĝa Societo).

Tre komfortaj ĉambroj, bonaj manĝaĵoj.

Oni parolas Esperanton.

English spoken. DS (106).

Presejo de BELGA ESPERANTO-INSTITUTO, Koopera Soc., Willemsstrato, 21, ANTVERPENO.